



Marto

2025

Esperanto-Informilo



Foto de G. Hennemann, en marto 2025: "Violkoloraj krokusoj apud vojpadon")

Mesaĝo de la prezidanto: Estas jam Marto. La komenco de la tria monato promesas sunon kaj pli altajn temperaturojn. Kaj baldaŭ estos tempo komenci sian impostodeklaron, kiu en germanio estas tiel malfacila, ke normala homo bezonas helpon; aŭ per komputilprogramo aŭ de profesiuloj. La nova kanceliero Frederiko Merco ja antaŭ 20 jarojn havis genialan ideon ke estontece ĉiu povus fari sian impostodeklaron sur biermapo, sed la popolo tute ne kredis lin. Hodiaŭ ni scias ke nur kun enkonduko de baza enspezo tiu ja eblus, ĉar tiam amaso da impostoj tute ne ekzistus kaj jam baldaŭ eĉ nenenu rimarkis ilian foreston.

Amuzan legadon,
G. Hennemann, 3-an de marto 2025

Rubrikaj ĉi-numere:

- Programo
- El la klubo
- Eseo
- Aforismoj
- Diversaĵoj
- Lasta paĝo

Kolofono:
Redaktoro teamo:
Georg Hennemann
Ulrich Fellmann
Korektanto: F.U.

Bankverbindung / bankkonto:

Esperanto-Gesellschaft F.a.M
IBAN: BE92 9051 1007 7223
BIC: TRWIBEB1XXX
bei: Wise, Belgien

Jahresbeitrag / jarkotizo:

ESF+DEB-Beitrag: 96 €
Familienmitglied: 48 €
Nur ESF: 24 €
Familienmitglied: 12 €

Unua mardo

La 4-an de marto 2025
ekde la 19-a horo: Sentema babilado per Zomo

Ligilo: <https://zoom.us/j/97497349753?pwd=OTBsMnladnA3UVhuRy9Ta0dYcFNldz09>

Dua mardo

La 11-an de marto 2025
ekde la 19-a horo: Interna babilado per Zomo

Ligilo: <https://zoom.us/j/97497349753?pwd=OTBsMnladnA3UVhuRy9Ta0dYcFNldz09>

Tria mardo

Surloke: Saalbau MÜZ Schönhof, Rödelheimer Str. 38, 60487 Frankfurt am Main

Dienstag, den 18. März, 2025 --- Mardo, la 18-an de marto, 2025

18:30 h Lingva Rondo

19:30 h Prelego: G. Schäfer
„Die Geschichte Lyons” --- “La historio de Liono”

Mardo, la 25-an de marto, 7pm

ekde la 19-a horo: „Senprograma samideana babila renkontiĝo“
Stattcafé, Gremppstraße 21, 60487 Frankfurt am Main

Bildfonto kappaĝo: Panorama vido el la 2021 rekonstruita Goetheturm

By Tobias.Nicol – Own work, CC BY-SA 4.0, <https://commons.wikimedia.org/w/index.php?curid=103455745>,

https://commons.wikimedia.org/wiki/Henninger-Turm#/media/File:Cityscape_Frankfurt_2021_Panorama.jpg

Anoncoj:

- 01.3. - 17.5.25 Esperantokurso por komencantoj de VHS Hochtaunus en
11:00-12:30 Uhr Oberursel: 1-a de marto ĝis 17-a de majo, 10 fojojn
sabate, 11:00 - 12:30
aliĝo telefone ĉe VHS Hochtaunus aŭ rete:
<https://www.vhs-hochtaunus.de> (serĉvorto: Esperanto)
- 19. – 23-3.25 Kurso por komencantokaj komencintoj de GEA en la junulargastejo en Kaub
dum la Bibliaj Tagoj kaj samloke, sed sendepende de ili.
Krom tio, bunta programo kun ekskursoj.
Informoj kaj aliĝo ĉe:
<https://www.esperanto.de/de/enhavo/lerni/kurse-vor-ort>
- 15.4.25 19:00 Uhr Membrokunveno en Saalbau MÜZ
- 28.7. - 17.8.25 Ferioj Saalbau MÜZ Schönhof



Marcio Esteves Cabral el Brazilo faris tiun foton de Paepalanthus-plantaro sur Veadeiros-Altebenaĵo, kaj per ĝi gajnis la unuan rangon en mondvasta fotografikonkurso en la temokampo "plantoj kaj fungoj". La plantoj donas la impreson de mem-lumeco, sed ili ne per si mem lumas, sed spegulas la sunradiojn de la tagiĝo-lumo. Tiuj raraj floroj estas parto de la Cerrado-biomo, kiu estas en risko de senarbarigo.

(Fonto: www.worldnaturephotographyawards.com/winners-2025)

Responda eseo pri baza enspezo

Opinia eseo de R. Pflüger

Komence mi atentigas pri kalkuleraro en la artikolo de Georg: 0,03 elcentoj de 100 EUR estas ne 30 cendoj, sed multe pli akcepteblaj 3 cendoj.

Nun al la unua vera diskuttemo: Oni ne trosimpligu la demandon pri la pensia sistemo kaj ne trotaksu la efikon de ŝanĝo. Norvegio havis kaj uzis la unikan ŝancon ŝpari monon por pensioj pro altaj enspezoj el nafto, pri kiuj oni sciis, ke tiuj iam ĉesos. Se oni volus ŝpari konsiderindan sumon ekzemple en formo de akcioj en Germanio, tiu mono devus veni de ie aldone – sed jam mankas bezonata mono. Sendepende de tio nur mono-bonhavo havas limigitan utilon. Se ne estas laborantaj homoj, kiuj produktas iujn varojn aŭ servojn, oni ne povas aĉeti ion kontraŭ tiu mono. Do oni ne atingas fundamente alian staton ol se tiuj laborantoj rekte pagas en la pensian sistemon.

Rilate al baza enspezo, ankaŭ ĝin oni devas financi. Georg proponas uzi transakcian imposton por ĝi. Sed se oni sukcesas havi ĝin, oni povas elspezi ĝin nur unufoje. Ekzistas aliaj temoj, kie mono estas urĝe bezonata: kontraŭbatali klimatsanĝon, kontraŭbatali mizeron en la mondo, plibonigi infrastrukturon, por nomi la plej gravajn laŭ mia opinio. Krome ne estas simple enkonduki transakcian imposton, ĉar spekulantoj forirus al aliaj landoj. Necesus interkonsenti minimume en EU, sed ankaŭ kun laŭeble multaj aliaj gravaj landoj. Tiam oni devus kontroli la financajn fluojn de nepartoprenantaj landoj: Ĉiu mono venanta de ĝi estu konsiderata impostenda enspezo ĝis pruvo de malo.

Tute alia problemo pri baza enspezo en la senco difinita de Georg kaj la retpaĝaro referencita de li: Ne ĉiu homo kapablas organizi memstare sian vivon. Kaj ĝuste tiu nekapablo estas ankaŭ malhelpo trovi laboron, tial inter senlaboruloj estas pli da tiaj homoj ol averaĝe kaj inverse inter tiuj nekapabluloj pli da senlaboruloj. Pliaj ja laboras, sed trovas nur malaltkvalifikan neinteresan laboron. Al ili en la situacio de baza enspezo ŝajnos bele rezigni pri laboro respektive pri serĉo de laboro, sed rezultos en tute senstruktura vivo kun pli da krimo kaj drogokonsumado.

Alia afero estus baza enspezo, kiu ne per si mem estas sufiĉa por vivi de ĝi, sed por forigi la bazan liberigon de imposto ("Grundfreibetrag") kaj la impostan progresion. Do ĝi estu tiel, ke homo kun enspezo malalta, sed sufiĉa por vivteni sin, ricevas la impostojn je tiuj enspezoj. Ĉe la alia flanko, la altaj enspezoj, oni kompensu malaltigon de impostoj per forigo de limoj ĉe la kalkulbazo por sana kaj pensia asekuroj. Tiam la imposta sistemo estus multe pli simpla: De ĉiu enspezita eŭro la sama parto iras al imposto. Maljusteco ĉe tiu principo estas forigata per la baza enspezo. Depende de la ekzakta kalkulo verŝajne estus iom da aldona subteno por homoj kun tre malaltaj enspezoj, do sociala afero. Por ke dungantoj ne misuzu tion, minimuma salajro almenaŭ je la nuna nivelo estas grava. Similan aferon oni povus fari pri kapitalenspezoj: Oni forigu la komplikajn "Sparerfreibetrag" kaj kompensu tion per pli alta baza liberigo de imposto (respektive pli alta baza enspezo, se oni enkondukas ankaŭ ĝin).

Aktiva baza enspezo (ABE) kompare al senkondiĉa baza enspezo (SBE) – ĉu plu realisma alternativo?

Eseo de Georg Hennemann

Paralele kun la senkondiĉa baza enspezo ekzistas la ideo de aktiva baza enspezo, la plej prominenta ekzemplo kaj aktiva projekto en la tielnomataj DACH-ŝtatoj Germanio, Austrio kaj Svislando estas projekto de Bernd Hückstädt kaj Margret Bayer el Künzelsau en Baden-Virtembergo, apud urbo Heilbronn. Ili ambaŭ fondis Akademion „Gradido Akademio Internacia – aŭ Gradido Akademio por ekonomia bioniko“. Bioniko traktas la transdonadon de naturaj fenomenoj al teknologio. Ĝi estas bazita sur la supozo ke vivanta naturo evoluigas optimumigitajn strukturojn kaj procezojn per evoluaj procezoj de kiuj ĉiuj homoj povas lerni. La esprimo "bioniko" estis lanĉita fare de la usona aerarmemajoro Jack E. Steele en la angla per ekvivalenta esprimo "bionics" ĉe simpozio en 1960. Tamen, la ideo malantaŭ ĝi estas multe pli malnova. De la

komenco mem, naturo estis la inspiro por la konkero de aerspaco. Jam en la 16-a jarcento, Leonardo da Vinci inventis flugmaŝinojn surbaze de la modelo de birda flugo kaj estas tiel konsiderata la prapatro de bioniko. Same kiel ĉiu aviadila inĝeniero devus studi birdan flugon, ekonomia bioniko devus esplori kiuj naturaj procezoj povus servi kiel modelo por sukcesaj ekonomiaj procezoj. Dum pli ol 20 jaroj, la Gradido-Akademio por ekonomia bioniko disvolvas alternativan "komunan bonvaluton", kiu baziĝas sur la modeloj de la naturo. La naturo sekvas la regulon, ke nur kie io pereas, io nova povas aperi kaj tiel longdaŭra plibonigo (evoluo) eblas. Ĝia recepto por sukceso estas la 'rondo de vivo'. Se nia ekonomio sekvus ĉi tiun naturan ciklon, ĝi, laŭ ekonomiaj bionikaj fakuloj, solvus preskaŭ ĉiujn mon-rilatajn problemojn de la mondo. La horo de ekonomia bioniko nun ŝajne estas venita: La tutmonda korona krizo ne nur kreas la bezonon reprivensi, sed ankaŭ emfazas la fragilecon de la reganta ekonomia sistemo. Ĝi ankaŭ malfermas novan aliron al la sukcesaj modeloj de la naturo, kiuj jam pruvis sin de kvar miliardoj kaj duono da jaroj. Kiel rezulto, la socio ĉiam pli antaŭĝojas la ankoraŭ junan sciencon de ekonomia bioniko kaj ĝiajn respondojn al la ekzistecaj demandoj de nia tempo.

Tri fatalaj eraroj de la malnova monsisistemo neeviteble kondukas al malriĉeco, ekspluatado, malsato, militoj, rifuĝintoj, malsano, media detruo kaj la rilataj naturaj katastrofoj. Se ĝi evitus ĉi tiujn erarojn, la homaro havas realisman ŝancon konstante liberigi sin de ĉi tiuj skurĝoj en mallonga tempodaŭro.

Eraro 1: Monkreado per ŝuldo. Pli ol 95% de la disponebla mono de la mondo (preskaŭ la tuta mono) estas kreitaj per ŝuldo. Ĉi tio signifas, ke ĉiu kredito unuflanke nepre rezultigas la saman kvanton da ŝuldo aliflanke. Ĉi tiu nulsuma ludo signifas "mi aŭ vi" - la leĝo de milito.

Eraro 2: Pro interezo kaj kunmetita interezo, la interspaco inter havaĵoj kaj ŝuldoj, riĉeco kaj malriĉeco, pligrandiĝas ĉiam pli.

Eraro 3: Nekonsiderante la ciklon de naskiĝo kaj morto igas nin sperti ĉi tiun naturan leĝon senvole. Nedezirataj formoj de pasemo inkluzivas financajn krizojn, kraŝojn, inflacion, militojn, median detruon kaj aliajn katastrofojn.

Kaj la ekonomia bioniko alportas la solvon: Malriĉeco, milito kaj media detruo ne devas ekzisti. La tero havas sufiĉe da rimedoj por nutri la homaron per altkvalita organika manĝaĵo. La sola afero, kiu malhelpas ĉi tion, estas la malamika financa sistemo, kiu nuntempe regas. Kun la trovoj de ekonomia bionika esplorado, ni povas transformi ĉi tion en paca maniero - por la avantaĝo de ĉiuj.

Fine malgranda pensinstigo - ABE kontraŭ SBE:

Prave estas dirite: kiu faras la monon, havas la potencon.

Se homoj ricevas universalan bazan enspezon (UBE), financita laŭ ajna maniero de la malnova financa sistemo, kiu havas la potencon? Se homoj kreas monon kaj tiel sian aktivan bazan enspezon (AGE) mem per sia kontribuo al la komunumo kaj per tio disvolvas sian plenan potencialon, kiu do havas la potencon?

Ĝuste. Senkondiĉa baza enspezo venas de supre. Ĝi devas esti financita iel de la aŭtoritatoj, kiuj provizas la monon. Aktiva baza enspezo, kiel antaŭvidita de Gradido, venas de malsupre. Ĝi estas krea ago: Ĉiu el ni kontribuas al kreado, estas kunkreado (angle: joint creation). La aktiva baza enspezo baziĝas sur senkondiĉa partopreno, t.e. vi havas la rajton kontribui al la komunumo per viaj interesoj kaj kapabloj kaj eĉ estas subtenata en tio. Ĉi tio estas multe pli ol nur senkondiĉa baza enspezo. Ĉu indas ke ankaŭ Esperantistoj okupas sin pri tiu novkreita komplementiga mono *Gradido*, tiel anstataŭante la abandonitajn Esperantajn monerojn *Spezo* kaj *Stelo*?

<https://gradido.net/de/economic-bionics/>

<https://gradido.net/de/financial-system/>

<https://gradido.net/de/basic-income/>

Diversaĵoj

Ŝerco (sendita de Gundhild):

La dentisto al la paciento: - Ĉu vi povus kriĉi laŭtege? - Kial?
- La atendejo estas plena, kaj la futbalmaĉo komenciĝos je la sesa.

Proverbo de la monato (elektita de G. Hennemann)

Hodiaŭ mi prezentas proverbon kiu indikas ke persono, kiu zorgas pri aliuloj, ofte neglektas siajn proprajn bezonojn.

Proverbo: "Ĉe botisto la ŝuo ĉiam estas kun truo."

Kaj variaĵoj de la proverbo en diversaj lingvoj:

amhara: la filo de la frizisto havas kapon plenan je pedikoj

bengala: la masonisto ne havas domon

japana: farbistoj de vestaĵoj paŝas en nefarbitaj pantalonoj

maroka araba: el la legomkorbo hejme ĉe legom-vendisto estas nenio por elpreni

svahila: la ceramikisto manĝas el rompita bovlo

https://www.robkeetlaer.nl/esperanto/proverbaro/proverbo_000213.htm

Nova enigmo

Kiuj el la sekvaj nekutimaj esperantovortoj estas Fundamentaj, kiuj estas neologismoj de la 21-a jarcento, kaj kiuj estis kreitaj de Zamenhof:

- (A) ri
- (B) na
- (C) bilo
- (D) iĉ
- (E) tpr
- (F) ts

Solvo de la januar-esperantinformila enigmo (erare ĝi ne aperis en nia februara informilo)

En la antaŭ-antaŭa "ei" estis demando pri la sesa de januaro, kristana festotago, nomita en Germanujo "Sanktaj Tri Reĝoj" aŭ, germanlingve, "Heilige drei Könige". La demando estis:

Kiu(j) el la tri vortoj el la nomo "Sanktaj Tri Reĝoj" estas ĝustaj, kaj kiu(j) estis poste inventitaj, sed ne havas faktan bazon en la Biblio?

La ĝusta solvo estis: Ĉiuj tri vortoj ne havas biblian bazon.

Unue, la rakonto pri tiuj vizitantoj, kiuj sekvis stelon ĝis Betlehemo por adori Jesuon, parolas nenie pri reĝoj. En ĝi uziĝas la greka vorto "magoi", t.e. "magiistoj", el kiu venis al ni la vorto magio. En la antikva tempo oni tiel nomis tamen klerulojn, kiuj okupiĝis pri alĥemio kaj astrologio. En germanlingvaj Bibliojoj oni tradukas tiun esprimon plej ofte aŭ per "Weise" (saĝuloj), aŭ per "Sterndeuter" (astrologiistoj).

Due, nenie en la Biblio estas menciita, ke temas pri tri personoj. Kaj frumezepoke oni ofte pentris aliajn nombrojn de tiuj saĝuloj, kvar, kvin, eĉ sep. Iam tamen oni atribuis po unu donacon al po unu persono, kaj tiel iĝis tradicio paroli pri ekzakte tri personoj.

Trie, la saĝuloj ne estis sanktuloj. Nek nomas la Bibliion ili tiel, nek estas ili deklaritaj sanktuloj poste fare de la katolika (aŭ alia kristana) eklezio.

Plej bone solvis la enigmon Gundhildo, kiu almenaŭ identigis du de tiuj tri vortoj kiel malĝustaj. Gratulon kaj dankon pro la partopreno!

La langorompilo (Ulriko)

En fonetika Telegramgrupo, ni lastjare kolektis kaj parte konstruis kelkajn langorompilojn kaj provis ilin flue paroli. Testu viajn kapablojn de tiuj du ekzemploj:

(1) Ŝi ŝerce ŝanĝis la ŝarĝaĵon ĝis ĝi ŝanĝiĝintis.

(2) Krabra karno de kranio kun karbo de krabo karnevale trinkas arkan kranan akvon.

Karnevalrilata historieto (de Ulriko)

Okaze de la karnevala sezono, kiu ĵus atingis siajn pintajn kaj lastajn tagojn, mi iom diskutis kun pola, ĉeĥa, kaj hungara esperantistoj en Matriksa kanalo pri la nomado de la "grasa ĵaŭdo" kiu same nomiĝas en multaj eŭropaj landoj.

Pri Germanujo mi informis, ke oni diras "grasa ĵaŭdo" ("fetter Donnerstag aŭ Fettdonnerstag") en Rejnlando, sed ĝi en sudokcidentgermanaj regionoj nomiĝas "malpura ĵaŭdo" ("schmutziger Donnerstag"). (Aliaj partoj de Germanujo ne havas karnevalajn tradiciojn.)

Sed komence neniu sciis, de kie venis tiuj esprimoj, kaj kion ili origine signifis.

Post konsultado de Vikipedio ni sciiĝis pri unu, la ŝajne ĝenerale akceptita, klarigo. Rilatis al la lasta tago kiam buĉisto rajtis produkti kolbasojn kaj kiam oni rajtis ankaŭ manĝi ilin antaŭ la tagoj, dum kiuj oni el diversaj kialoj ne rajtis manĝi viandon, sekvataj de 40-taga fastotempo ekde cindronerkredo. Pro tio, oni dum tiu tago devis

formanĝi ĉiujn kolbasojn kaj viandaĵojn, ankaŭ la grason. Tiu kaŭzis, ke ĉiu poste estis malpura kaj ne nur interne, sed ankaŭ ekstere kaj survestaĵe plengrasa kaj malpura.

Tamen, unu esperantisto diris, ke krom tiu kutima versio ekzistas en Aŭstrujo alia rakonto:

>>

En la 19-a jarcento, la Viena presisto Fridriĥ Lins onidire misaranĝis presilon tiel, ke oni presis multajn kalendarojn kun la lasta Februara ĵaŭdo en grasaj literoj, kiuj ordinare estis rezervitaj por oficialaj festotagoj k.s. La eraron neniu rimarkis, ĝis la kalendaroj disvendiĝis, kaj homoj, kiuj estis konfuzitaj pri la nova grava tago, kaj havis neniun indikon pri ĝia signifo krom la grasaj literoj, eventuale kutimiĝis nomi ĝin »grasa ĵaŭdo«. Tiu kutimo iom post iom transpreniĝis de aliaj proksimaj landoj kaj regionoj.

<<

Ni ĉiuj ŝatis tiun rakonton, kvankam mi ne povis interrete trovi ĝin ie ajn. Post iom da tempo, la rakontisto skribis: "Sed ankaŭ eblas, ke ne [estis tiel], ĉar mi ĵus elpensis tiun historion." 😊

Lasta Paĝo


La famkonata biermato de nuna kanceliero Frederiko Merco (germane: Friedrich Merz) kiu tiel antaŭaŭguris la universalan bazan enspezon.

<https://www.hdg.de/lemo/bestand/objekt/archivgut-bierdeckel-steuererklaerung-merz.html>

<https://www.mein-grundeinkommen.de/magazin/grundeinkommen-finanzierung-erklaerung>



Aforismoj - Hazarda malkovro el la interreto



„Ni ŝatus informi vin, ke ni movis la verkojn de post-apokalipsa sciencfikcia literaturo al la sekcio de aktualaj aferoj.“